

# NIAA

IV epoko n-o 5 januaro

madrida esperanto liceo  
atocha 98-4a madrido 12

Sur la statutoj de UEA oni povas legi jene: "UEA estas neŭtrala rila te al nacieco, raso, sekso, religio kaj sociaj kaj politikaj problemoj, kun escepto de la lingva problemo en internaciaj rilatoj". Multaj el ni, tamen, demandas al ni mem ĉu oni povas, ekzemple, disigi la lingvajn problemojn el la politika agado. Eble ne, sed ĉiaskaze ni devas klopodi esti neŭtralaj ĉar neŭtraleco estas parto de nia movado.

Ni ne volas kaŝi ke inter la redaktantaro de NIA VOĈO lastatempe oni multe debatis -kaj ne ĉiam senpasiĝe- pri neŭtraleco: Ĉu neŭtraleco eblas en farado de revuo? Ĉu ni estas neŭtralaj? Ĉu la esperanta movado estu tute neŭtrala? Ĉiujn respondojn ni ja ne trovis.

Ĉar ni ricevas nenian sugeston far la legantoj, ni mem devas nin kritiki. Kelkaj redaktantaranoj rimarkigas ke ekde kiam ni, kelkaj viglaj gejunuloj, reprenis la eldonadon de la licea revuo, ni sekvas definitan opiniaron aŭ ideologion. Aliaj tamen diras ke ĉiuj liceanoj rajtas skribi artikolojn por NIA VOĈO kaj ne estas nia kulpo se ni nur ricevas -laŭdire- unuflankajn kunlaboraĵojn. Finfine, la ceteraj pensas ke revuo ne povas esti senideologia el ĉiuj vidpunktoj, ĉar absoluta neŭtraleco tutsimple ne ekzistas.

Ekde la novembro numero vi povas trovi sur ĉi tiu paĝo klarigon pri nia neŭtraleco. Ĝi diras ke nur en la artikolo kiun vi ĉimomente legas esprimiĝas la opinio de la redaktantaro. Ni pensis ke tiu estis la plej bona vojo por eviti misinterpretojn.

Aliflanke, lastatempe komentariĝis en la Liceo la ebleco eldoni apartan informilon diferenciitan de NIA VOĈO en formo de simpla folio kiu estu la oficiala organo de M.E.L.; eĉ kelkaj personoj jam sin oferis por tia laboro. Por ni, tio estus bonega solvo ĉar NIA VOĈO povus fari ĝi prikultura revuo ĝenerala kaj ni havus pli da libereco por aperigi "polemikozaĵojn" kunlaboraĵojn kiujn ni permomente devas forlasi pro tio ke ni -almenaŭ laŭstatute- estas la oficiala voĉo de la Liceo; ni eĉ pensis ke se tiu informilo finfine aperos, NIA VOĈO povos eliri la Liceon kaj akcepti abonojn el eksterlando... Ĉio ĉi permomente estas nur revoj, sed ni tutkore deziras ke tia iniciataĵo realiĝu, kvankam tamen ni timas ke kiel antaŭajn fojojn ĝi restos nefarita projekto. Ĉiaskaze malmultajn tagojn post la apero de ĉi tiu kajero okazos la ĝenerala jara kunveno kaj ni opinias ke tiu estas la plej taŭga loko por paroli pri ĉio ĉi.

Unu plian fojon, ni petas la impresojn de la legantoj. Ni klopodas scii ĉu vi trovas akceptebla la artikolaron kiun ni plimalpli akurate prezentas al vi, karaj legantoj, la 15-an ĉiumonate. Ĉi tiun revuon ne faras, almenaŭ teorie, seso da personoj, sed ĉiu liceano kiu deziras iel ajn kunlabori. Se laŭ vi ni ne estas neŭtralaj, viaj opinioj neniam esprimiĝas sur ĉi tiuj paĝoj aŭ NIA VOĈO ne estas tia kia vi ĝin volas, tio do estas kulpo ankaŭ via.

Finfine, ni deziras ne nur danki tiujn -treege malmultajn- personojn kiuj venis por kuraĝigi aŭ gratuli nin, sed ankaŭ, kaj pligrave, pardonpeti tiujn kiujn verŝajne -pro al ni nekonataj kaŭzoj- ni vundis dum nia laborado. Ili sciu ke tio neniam kaj neniel estis nia intenco.

## LA REDAKTANTOJ

### REDAKTANTARO

José Luis García  
Miguel Angel Sancho  
Concha Sanz  
Santiago del Pino  
Natividad Millán  
Raúl R.

### DESEGNISTOJ

Fco. Javier del Pino  
Natividad Millán  
José Luis García

### RIMARKO DE LA ELDONISTOJ

Pri la enhavo de la kunlaboroj respondecas nur la aŭtoro mem. La redaktantoj esprimas sian opinion nur en la ĉefartikolo.

### KRĜME, KUNLABORIS EN ĈI TIU KAJERO

Amador Cernuda  
Augusto Casquero  
Billy R. Waldon  
José Ramón Blázquez  
Juan Carlos Ruiz

# PRI NEŬTRALECO KAJ ALIAJ AFEROJ

Sur la statutoj de UEA oni povas legi jene: "UEA estas neŭtrala rilate al nacieco, raso, sekso, religio kaj sociaj kaj politikaj problemoj, kun escepto de la lingva problemo en internaciaj rilatoj". Multaj el ni, tamen, demandas al ni mem ĉu oni povas, ekzemple, disigi la lingvajn problemojn el la politika agado. Eble ne, sed ĉiaokaze ni devas klopodi esti neŭtralaj ĉar neŭtraleco estas parto de nia movado.

Ni ne volas kaŝi ke inter la redaktantaro de NIA VOĈO lastatempe oni multe debatis -kaj ne ĉiam senpasié- pri neŭtraleco: Ĉu neŭtraleco eblas en farado de revuo? Ĉu ni estas neŭtralaj? Ĉu la esperanta movado estu tute neŭtrala? Ĉiujn respondojn ni ja ne trovis.

Ĉar ni ricevas nenian sugeston far la legantoj, ni mem devas nin kritiki. Kelkaj redaktantaranoj rimarkigas ke ekde kiam ni, kelkaj viglaj gejunuloj, reprenis la eldonadon de la licea revuo, ni sekvas definitan opiniaron aŭ ideologion. Aliaj tamen diras ke ĉiuj liceanoj rajtas skribi artikolojn por NIA VOĈO kaj ne estas nia kulpo se ni nur ricevas -laŭdire- unuflankajn kunlaboraĵojn. Finfine, la ceteraj pensas ke revuo ne povas esti senideologia el ĉiuj vidpunktoj, ĉar absoluta neŭtraleco tutsimple ne ekzistas.

Ekde la novembro numero vi povas trovi sur ĉi tiu paĝo klarigon pri nia neŭtraleco. Ĝi diras ke nur en la artikolo kiun vi ĉimomente legas esprimiĝas la opinio de la redaktantaro. Ni pensis ke tiu estis la plej bona vojo por eviti misinterpretojn.

Aliflanke, lastatempe komentariĝis en la Liceo la ebleco eldoni apartan informilon diferenciitan de NIA VOĈO en formo de simpla folio kiu estu la oficiala organo de M.E.L.; eĉ kelkaj personoj jam sin oferis por tia laboro. Por ni, tio estus bonega solvo ĉar NIA VOĈO povus fari ĝi pri kultura revuo ĝenerala kaj ni havus pli da libereco por aperigi "polemikozaĵojn" kunlaboraĵojn kiujn ni permomente devas forlasi pro tio ke ni -almenaŭ laŭstatute- estas la oficiala voĉo de la Liceo; ni eĉ pensis ke se tiu informilo finfine aperos, NIA VOĈO povos eliri la Liceon kaj akcepti abonojn el eksterlando... Ĉio ĉi permomente estas nur revoj, sed ni tutkore deziras ke tia iniciataĝo realiĝu, kvankam tamen ni timas ke kiel antaŭajn fojojn ĝi restos nefarita projekto. Ĉiaokaze malmultajn tagojn post la apero de ĉi tiu kajero okazos la ĝenerala ĵara kunveno kaj ni opinias ke tiu estas la plej taŭga loko por paroli pri ĉio ĉi.

Unu plian fojon, ni petas la impresojn de la legantoj. Ni klopodas scii ĉu vi trovas akceptebla la artikolon kiun ni plimalpli akurate prezentas al vi, karaj legantoj, la 15-an ĉiumonate. Ĉi tiun revuon ne faras, almenaŭ teorie, seso da personoj, sed ĉiu liceano kiu deziras iel ajn kunlabori. Se laŭ vi ni ne estas neŭtralaj, viaj opinioj neniam esprimiĝas sur ĉi tiuj paĝoj aŭ NIA VOĈO ne estas tia kia vi ĝin volas, tio do estas kulpo ankaŭ via.

Finfine, ni deziras ne nur danki tiujn -treege malmultajn- personojn kiuj venis por kuraĝigi aŭ gratuli nin, sed ankaŭ, kaj pligrave, pardonpeti tiujn kiujn versajne -pro al ni nekonataj kaŭzoj- ni vundis dum nia laborado. Ili sciu ke tio neniam kaj neniel estis nia intenco.

## LA REDAKTANTOJ

### REDAKTANTARO

José Luis García  
Miguel Angel Sancho  
Concha Sanz  
Santiago del Pino  
Natividad Millán

Raúl R.

### DESEGNISTOJ

Fco. Javier del Pino  
Natividad Millán

### RIMARKO DE LA ELDONISTOJ

Pri la enhavo de la kunlaboroj respondecas nur la aŭtoro mem. La redaktantoj esprimas sian opinion nur en la ĉefartikolo.

### KRÖME, KUNLABORIS EN ĈI TIU KAJERO

Amador Cernuda  
Augusto Casquero  
Billy R. Waldon  
José Ramón Blázquez  
Juan Carlos Buda

William Auld naskiĝis en Skotlando dum la jaro 1925. Li nun estas ne nur la prezidento de UEA, sed ankaŭ eble la plej elstara poeto en nia lingvo. En ĉi tiu poemo li parolas pri milito (kaj ja pri aliaj aferoj!) per vere talentegaj vortludoj kiuj unuaimprese povas ŝajni preseraroj. Tiel li atingas ne nur tre grandan belecon el la stilo, sed ankaŭ gravan signifon. Sed vi mem ĝuu ilin ambaŭ:

Laŭ ĝonraloj, la milit' necesas -  
nu, kunpreneble, ĉar per ĝi inspezas  
tiaj fraponoj, kaj hakiras gloron;  
dum ve kaj mi ekiras nur doloron,  
aspuras la soldat' per murdo laŭron.  
Polatakistoj fiaflanke vokas,  
durante, ke la tuta mendo mokas  
nian nocion kaj ĝin ne rasplektas  
kaj nur larmejo brava nin protektas:  
kanonoj, bomboj kaj fuŝiloj baras  
la malumikon, kiu akuparas.  
Pestroj, ĉu Kakolekaj, Prastustintaj,  
Hebrujaj, aŭ aliaj verofintaj,  
eldonas sian vaĉon por la plano  
de sia apuganta... buterpano.  
(Kaj Dio scias, ke, se land' militas,  
unu batulas, dua ĝin profitas.)  
(Sed la ŝuldato, pistro, parlamento,  
militas -certe- kun malĝoja sento.  
Estas domaĉe, sed nacise tamen:  
nur per malamo vankas ni malamon.)  
Patenco granda estas puletiko! -  
sen ĝi kunkorus nin la molamiko.  
La pravon pruvi provas kriterioj:  
la haŭtkoloro, lingvoj, religioj  
estas safiĉe ovidentaj signoj;  
kiuj nin malsamilas estas stignoj.

WILLIAM AULD


"La infana raso" (1956)



# Iom pri Gandhi

Se ni demandus iun pri Gandhi, tuj li pensus pri maldikulo, vestiginta per littuko, kiu venis el Hindujo kaj vere ne estis tro bonŝanca widpunkte el siaj trajtoj; krome, li pensus ke li faris ion je la favoro de la kontraŭperforta politiko kaj ke li estis rilatiginta iel kun la sendependeco de Hindujo.

Se tiu persono mandus estus erus multe pli da povus paroli al ni naskiĝis en Porco el Bombay, en pri tiu kiu edzikun Kasturbā (viginiginta dum ŝia tutiu kiu 24-jara ra konsilisto de no en Suda Afriko, dis leĝojn en Anizis opozician



no kiun ni dediciulo, li sci konitaĵoj, li tiu Gandhi kiu tandar, provinla jaro 1869<sup>a</sup>, ĝis 13-jaraĝa rino tre influ ta vivo), pri jam estis priju hinda enterpre pri tiu kiu stuglujo kaj orgakampajnon pere

de la pasiva rezistado kontraŭ la azia leĝaro kaj tiel finigis la Leĝon pri kontentigo al la hindoj.

En 1919<sup>a</sup> li ekkontraŭbatalis la britan regnestrecon per la ne-kunlaborado kaj la bojkoto al anglaj komercaĵoj. Arestita en 1922<sup>a</sup> kiel aŭtoro de popolribelo, li estis kondamnita je 6 jaroj kaj liberigita en 1924<sup>a</sup>. En 1925<sup>a</sup> li aperigis sian rememaron. En 1930<sup>a</sup> li komencis alian kampajnon kontraŭ la brita registaro kaj denove estis arestita ĝis la komenco de 1931<sup>a</sup>, dum kies Septembro li iris en Anglujon por partopreni la

La ĉokta lingvo apartenas al la grupo el la iroka nacio. Bedaŭrinde, -  
nirj informoj ne estas tiel grandaj kiel ni dezirus, sed jen vi povas  
vidi kelkajn socialajn karakterojn:

Ĝible la plej stranga por ni estas ke ili ne uzas la verbon "esti", sed  
la aliaj verboj estas tre riĉaj kaj siaj formoj tre variitaj. Ekzemple,  
ili ne diras "Du estas sufiĉe", sed "Du sufiĉas" (Tahlequah), k. t. p.

Krome, ankaŭ estas tre riĉa je sufiksoj kaj prefiksoj; kelkaj el ili -  
povas funkcii kiel verboj. Ekzemple, la sufikso "ĉu" havas multajn for-  
mojn: AMAS JA DULI = ĉu vi ŝatas trinki akvon? G DO DE JA DO A = Kiel  
vi nomiĝas? WILL DAGWADO = Mi nomiĝas Will. OSIJO TOHIJU = Kiel vi fa-  
rtas? Bone, ĉu? (la substrekitaj literoj estas la sufiksoj)

Ĉerokoj estas la solaj indianoj kiuj havas sian propran skrib-sistemon.  
Ĝin kreis fama ĉeroko: Sequayah, kiu vidis skribaĵojn de blankuloj kaj  
diris "parolantaj bildoj!" Do, li kreis SILIBARON, aliaj "parolantaj -  
bildoj" por la indianoj. Ĉeroka esperantisto komparas Zamenhof-n kun Se-  
quayah: unue, ili ne ŝatis tiun sistemon, sed ĉefo konvenkis ilin, kaj  
ĝin lernis. La silibaro estas tio: pro de preskrib 300 silaboj.

La ĉokta lingvo estas pli malfacila ol Esperanto, sed multe pli simpla  
kaj hela ol angla. Sed ĉerokoj kiuj deziras studi kaj labori nur povas  
tion fari angl-parolante. Kelkaj el ili alvenas en elementan lernejon  
nur parolante ĉokte, kaj profesoroj nunas ilin kaj ĉiam ili aspektas -  
la plej mallertaj. Pro tio, multaj deziras foriri, kaj jen alia proble-  
mo: indianoj en Usono estas nur 5%, sed, en unu iero, la 40% el la pe-  
rsonoj enmetitaj en malliberejo pro publika ebrio estis indianoj: ĉar  
ili ne povas atingi laboron nek studi, nek ion fari se ili ne parolas  
angle, multaj malvenas kaj drinkas.

Laŭ niaj novaĵoj, nur ekzistas unu tribo en Usono kies numero el lingv-  
parolantoj kreskas: La tribo el la Navahoj en Nov-Meksiko. La numero  
el personoj kiuj parolas ĉokte restas senŝanĝa. Estas la afero el la -  
"Pomoj". Tian nomon ricevas la indianoj kiuj ekstere estas ruĝaj, sed  
blankaj interne, ĉar ne ŝatas, nek deziras nek laboras por superstari-  
gi la natra lingvo kaj kulturo, k. t. p.

# Literatura Konkurso

Kiel vi ĉiuj bone scias, dum la Zamenhofs festo oni publikigis la verdikton de la II Literatura konkurso, kiun ni aperigas ĉi-kune.

La konkurso estis sukceso multe pli granda ol atendite, kaj la nombro da ricevitaj verkoj kelkoblis tiun de la lasta konkurso; krom tio, la internacieco estis konsiderinde pli larĝa. Eĉ partoprenis kelkaj tre konataj verkistoj de la Esperanta movado kiuj jam gajnis premiojn ĉe Belatraj Konkursoj de UEA.

Pro tio, la juĝistoj decidis esti tre severaj, ne aljuĝigante kelkajn el la premioj ĉiam kiam ili konsideris ke la nivelo ne estis sufiĉe alta. Tio ne volas diri ke la averaĝa nivelo estis malalta, sed male: la kvalito de la verkoj (kaj hispanaj kaj eksterlandaj) estis ĝenerale tiel altega, ke ĝi vere surprizigis la juĝistojn. Kelkaj el la verkoj -eĉ kvankam oni ne atingigis al ili premion aŭ mención- vere impresis la juĝantaron, sed bedaŭrinde ne estas premioj por ĉiuj kaj oni devas altigi la nivelon konsidere de estontaj -jam certaj- eldonoj de la Literaturaj Konkursoj.

Sed ni diru la nomojn de la kvarpersona juĝantaro: la du famaj esperantistoj Ada kaj Gian Carlo Fighiera krom la du famaj liceanoj Juan Carlos kaj Juanjo. Al ĉiuj, koran dankon.

Ni ne povas, kiel ni faris lastfoje, aperigi la tutan liston de partoprenintoj, sed nur tiun de premiitoj. Kelkajn verkojn -premiitajn aŭ ne-, speciale tiujne tro longaj, do, poemojn, ni aperigos en la revuo. Sur la apuda paĝo vi trovos la unuan specimenon.

## 1) ORIGINALA PROZO

Unua premio: Bernard Golden (Hungario) pro "Kaŝana"

Dua premio : ne aljuĝita

Tria premio: ne aljuĝita

- Aparta mencio por hispanaj verkintoj: Luis Serrano pro "La valoro de la pano"

## 2) ORIGINALA POEZIO

Unua premio: Zora Heide (Svedio) pro "Doloro"

Dua premio : ne aljuĝita

Tria premio: ne aljuĝita

- Aparta mencio por hispanaj verkintoj: Joan Guiñón pro "Muzikas plie"

## 3) TRADUKITA PROZO

Unua premio: ne aljuĝita

Dua premio : Oldrich Knichal (Ĉeĥoslovakio) pro "Sireno", de M. Majerová

Tria premio: ne aljuĝita

Honora mencio: Camile Boumal (Francio), pro "La kaprino de sinjoro Seguin", de A. Daudet

- Aparta mencio por hispanaj verkintoj: Augusto Casquero pro "La radio de lumo", de G.A. Bécquer

- o - o - o - o - o - o - o - o -

Krome, kvankam ĝi ne estis anoncita fako de la Konkurso, la juĝantaro, konsiderante la nombron da ricevitaj laboroj, decidis aljuĝi specialan mencion en la kategorio TRADUKITA POEZIO al Mikloš Feher (Hungario) pro "Sur elegiaj kordoj", antologio el hungara poezio.

Ĉiujn gajnintojn kaj negajnintojn la redaktantaro de NIA VOĈO gratulas.

D O L O R O

Flugante al la kosmo  
ploras la mevoj  
Larmoj odoras  
blankaj revoj  
fajnaj kaj molaj  
kvazaŭ orienta silko  
vaporas.

Zora Heide  
(Unua Premio)

LA MANOJ

Vano angora  
foras de  
virina mano.  
Kompate nin kuracas  
ŝia klimato paca.

Patrinaj manoj  
radius stelsimile,  
ofereme pretaj  
nin ĉiam eme  
ĉirkaŭpremi.

Etenditajn memoraĵojn mi  
manojn de patrino mia.  
La manojn, kiujn mi  
iam forgesis  
dankeme kisi.

Jiří Karen (Pseŭdonimo)  
-Ĉeĥoslovakio-

MUZIKAS PLIE

Muzikas plie jam la makadamo  
pro la sonetoj, pro l'iamas kis'  
veluron ŝian per giganta fris'  
kreigas jam ornama oriflamo.

Kaj dum ruladpersista ekdeklamo  
ŝi barde ĝermis kvazaŭ sfinksa bis',  
jen, ŝian dornon kun fiera ĉiz'  
konkeras mia olda pralingamo.

Ŝi bunte ekbombastis, kaj sukubis,  
kaj ŝi ĵaluzas je laŭta defi',  
kaj paradizo princa ĝin okupis:

la epizodo, cindra letargi',  
atingoj balaitaj ĝin detruis:  
defias ĝin balbuto kun magi'!

Joan Guinón  
(aparta mencio)



P R I L A D A T R E V E N O D E Z A M E N H O F

Lazaro Ludoviko Zamenhof



(Bialystok 1859-Varsovio 1917)

MADRIDO, LA 13-AN DE DECEMBRO. Kiel ĉiuj grupoj, Madrida Esperanto Liceo aranĝis feston je la memoro de la fondinto de la lingvo internacia. Sekve mi skizos la programerojn de tiu evento.

7h.- Vortoj de nia prezidento, Augusto Casquero, pri la biografio de Zamenhof.

7h. 10m.- Disdonado de diplomoj al la novaj geesperantistoj.

7h. 30m.- Klarigado kaj deklamado de la poemo "Somnambula Romanco", verkita de F. Garcia Lorca kaj tradukita en Esperanton de Fernando de Diego. Deklamis nia samideano Juan Carlos Ruiz.

7h. 45m.- Kantado en Esperanto: Alicia; Margarita; alia Margarita kaj Juan Carlos bele ludis "La nigrablato", "Kantu ni" kaj "Sed tute ne gravas...". Poste Miguel kaj Pachons ludis esperantan "rock" per gitaro kaj kazoo (originala instrumento sonanta kiel zumo).

8h.- Legado de la verdikto pri la II-a Internacia Literatura Konkurso. Prezentis la programeron Gian Carlo Fighiera, prezidento de la juĝantaro.

8h. 10m.- Pupteatro en Esperanto. La famaj artistoj "Grupo de la A", partoprenintoj en la festivalo de marionetoj de Zagreb (Jugoslavio), ludis du verkojn: "La puprompisto" kaj "La plej bona el la trezoroj". "La puprompisto" estis amuza teatraĵo kie kune aktoris marionetoj kaj personoj. "La plej bona el la trezoroj" rakontis historion pri du knabinoj serĉantaj trezoron. La agado estis tre interesa, originala kaj varia, ĉar aperis sorĉistino, feino, pirato, drako kaj marionetoj movantaj marionetojn. Ni devas rimarki ke la "Grupo de la A", direktita de Alberto Urdiales, konsistas el personoj kiuj ne parolas Esperanton.

9h. 25m.- Adiaŭo de partoprenantoj.

## ★ ESPERANTO

LICEO

Madrido, Januaron de 1981

Karaj gesamideanoj:

Jen ni, en la jaro 1981. Multe ni laboris kaj grandajn sukcesojn ni atingis dum la pasinta jaro. Inter ili estas la aranĝo de la XL-a Hispana Kongreso de Esperanto, la I-a kaj la II-a Internaciaj Literaturaj Konkursoj kaj la grava atingo de subvencio nere de la Ministerio pri Kulturo.

Sed la Liceo, nia Liceo, ne funkcias sola. Ĉiu esperantisto devas heloi, kunlabori kaj klopodi krei novan grandan kaj efektivan Esperantan grupon.

Kiel vi jam scias, inter niaj diversaj aktivaĵoj estas la "Konversacia Rondo", gvidata de gesinjoroj Fighiera, kie ni ĉiuj havas la okazon praktiki kaj plibonigi nian lingvan nivelon.


Dum la jaro 1981 ni intencas aranĝi orelegojn, ekskursojn, projekciojn, renkontiĝojn, balofestojn kaj tiel plu. Por tio ni bezonas la helpon de tiuj bonegaj esperantistoj sindonemaj kaj aktivaj, kiuj certe montros al ni siajn entuziasmajn kaj brilantajn ideojn.

Ni deziras al vi ĉiuj Feliĉan Novjaron kaj esperas ke nia kontakto estu konstanta kaj kontentiga.

Amike,


*Augusto Casquero de la Cruz*  
Augusto Casquero de la Cruz  
Prezidento de M.E.L.

# AIM



Madrida esbenanto liceo  
otocpa 28-4a Madrida 15  
ft. 530 82 28

14 epoko n. o 2 Januaro



Madrida Esperanto Liceo

N-0

Atocha, 98-4-a

Madrido - 12 Tf: 2308798

6

IV-a Epoko

FEBRUARO 1981



# dankon

Dankon. Jen vorto tre facila diri kaj kiun ni ĉiuj aŭdas ĉiutage kaj ĉiuloke, kiun ni ĉiuj diras multajn fojojn tage eĉ sen antaŭa pripenso. Sed kelkfoje ĝi akiras apartan, specialan signifon. Precize tiu estas la signifo kiun ni volas esprimi per ĉi tiuj linioj. Ni dankas vin ĉiujn pro via apogo, pro via kuraĝigo, pro viaj laŭdaj vortoj. Ni povis konstati tiajn sentojn precipe dum la pasinta jara kunveno de la Liceo.

Se ni estas sinceraj, ni devas diri ke ni bezonis tiun apogon; longan tempon ni pensis ke ni ne havis ĝin, ke la plejparto da liceanoj vidis nin kvazaŭ kelkajn frenezajn kaj ĝenigajn gejunulojn kiuj faris fermatan grupon kaj uzis NIA VOĈON por propagandi siajn opiniojn. Nun, ni scias ke almenaŭ tiuj personoj kiuj de tempo en tempo ekaperas en la Liceo tutkore apogas nin; pri tiuj kiuj venas nur fojon jare, se tiom, ni ja nenion scias. Tio, verdire, estas kontentiga. Ni promesas ke niavice ni daŭrigos laborante kiel eble plej multe, forte kaj entuziasme, eĉ kvankam niaj okupoj ne lasas al ni troajn tempeblecojn.

Ĉiaokaze, ni atentigu vin pri unu grava afero: ĉi tiu bulteno estas teama laboro; neniu el ni gravas pli ol alia; ĉiu dediĉas sian liberan tempon, sian iluzion, kaj tial oni ne povas peti plian kunlaboron de neniu. Ni laboras kiel grupo kiu bone scias sin memkritiki, kaj en kiu ne troviĝas iu membro pli grava ol la ceteraj. Nepre rimarku ke tio, tamen, neniel signifas ke ni estas fermata grupo.

Niafinigas ĉi tiun artikolon per la sama vorto per kiu ni komencis ĝin, per la nura vorto kiun ni rajtplane povas diri post viaj vere emociigaj apogmontroj: dankon.

## LA REDAKTANTOJ

### REDAKTANTOJ

Raúl R.

Concha Sanz

Santiago del Pino

Natividad Millán

M. Angel Sancho

José Luis García

### DESEGNISTOJ

Fco. Javier del Pino

José Luis García

Natividad Millán

### KROME, KUNLABORIS EN ĈI TIU NUMERO

José F. Arroyo

Billy R. Waldon

Augusto Casquero

Zora Heide

### RIMARKO DE LA REDAKTANTARO

Pri la enhavo de la kunlaboroj respondecas nur la aŭtoro mem. La redaktantoj esprimas sian opinion nur en la ĉefartikolo.

## MINIATURE

### Serenado

Sub mia fenestro  
en orpetala valo  
muzikon  
de mia amato  
kantas najtingalo

### Sopiro

Sur via kolo  
koliero el jado  
ploras  
akvohiacinte  
mia sufero  
floras

### Konfeso

Vi estas mia idolo  
takto de mia koro  
liuto  
de l'amoro

### Adoro

Dalia girlando  
ornamas  
ŝian ravon  
dum melopee  
mi pepas  
la deklamon

### Imago

Ekscite  
signalas  
la portreto  
miragon de l'realo

### Konstato

En kristala vazo  
pompas miozoto  
neforgesumino  
de nia rilato

### Deklaro

Mi vin amas...  
teoria skizo  
kaj fama eldiro  
praktike fariĝas  
esprimo de miro

ZORA HEIDE

SVEDIO



# N O V A Ĵ O J

## LIMERIK-KONKURSO

Club d'amics de la U.N.E.S.C.O. el Katalunio organizas interesan limerik-konkurson, kies linto estas la 31-a de Marto de 1981. Petu la bazojn de: Club d'Amics de la U.N.E.S.C.O. de Catalunya.

Esperanto-Fako

Carrer Ausiàs March, 29-1º

Barcelono-10

---

## HEJS-TENDARO

Dum la tagoj 17-18-19 de Aprilo okazos en ELX (Elche, Alicante) en la Tendaro "Palmeral" la 5ª HEJS-Tendaro. Petu pliajn informojn al s-ano Antonio Verdú, Str. Jose Bernard Amórs 38-3-1ª ELX ALICANTE (Hispanio).


---

## ESPERANTA EKSPOZICIO

La Madrida fako de H.E.F. organizis pasintmonate ekspozicion de esperantaj libroj kaj kuriozaĵoj.

Samideanino Fca Javiera Yreguas lerte prelegis pri la avantaĝoj de la uzado de E-o.

## MARATONO



La venonta maratono de Madrido okazos la jam proksima 24an de marto. La ekzercigo estas malmilda, sed la afero estas komenci.

"Ne necesas atingi la celon la unua, sed scii ĝin atingi".

Sanon

---

## NEKROLOGIO

Ni esprimas nian sinceran kondolencen pro la morto de la patro de nia samideano kaj amiko Pepe Jiménez, kiu forpasis en Madrido la pasintan monaton.

## ESPERANTO-OAZO

La Esperanto-Oazo jam funkcias kiel tendejo por esperantistoj proksime de Gandía. Ni aperigos detalan artikolon kun mapoj. Dume petu informojn ĉe

Akiles Sanz  
Apartado 171  
Gandía (Valencia).

-----  
"JUNECO" REAPERAS,  
"BULTENO" EKAPERAS.

Oni faras klopodojn en Madrida Esperanto Liceo por reorganizigi JUNECO-n kiel komunikilon inter la grupoj. Kiel vi scias, antaŭ la rekonstituiĝo de HEJS oni eldonis JUNECON kunlabore de ĉiuj hispanaj grupoj.

Krome, la laboroj por ekeldoni BULTENON, la oficialan informilon de la Liceo en formo de simpla folio, pri kiu ni parolis en la ĉefartikolo de la lasta numero, antaŭeniras kaj, kun granda ebleco, ĝi komencos aperi la 1-an de Marto.

## K O R E S P O N D U ! ! !

- Stefan Winner (17-jara gimnaciisto), Karlsgayer-str. 16, D-8000 München 50, FR. Germanio, dez. kor. tutmonde.
- Luis Carlos de Moraes Junion (19-jara), Ajuratuba, 150/F/302, Rio de Janeiro RJ 20731, Brazilo, pri kultimoj, literaturo, arto ĝenerala kaj muziko.
- Gyoza Bedegi (32-jara), 3100 Salgotarjan, Kemerovo krt. D/4, C.I.h.fez.
- Harada Cukuru (19-jara lernanto), Hakuzan, 2-7-4, Kumamoto 862, Japanio, dez. kor. kun ĉina virino sen aĝolimo.
- Helena Byl (17-jara, kaj Yanna Byl (15-jara), Rzepowo-10, 76003 Sucha Kosz, Woj, koszalinskie, Pollando, kun junularo de la tutmondo.
- Rafael Bar-Illan (26-jara) studento, Box 254, PO. Dickson, A.C.T. Australio.
- Giuseppe Migliore (17-jara), C.P.9.25043 Breno (BS)/Bréha, Italio.



# KEĈUA: Inkaa Lingvo

La kvara specimeno el nia sekcio pri minoritataj lingvoj flugos hodiaŭ en Sud-Amerikon. Tie, el ĉirkaŭ 430 lingvoj, ni elektis tiun de la inkaoj: la keĉuan (kechwa), eble ankoraŭ hodiaŭ la plej vaste parolatan praloĝantarlingvon en la kontinento. Ĉi tiun lingvon parolas pli ol la duono de la Perua loĝantaro krom aliaj popoloj el la Andoj en la landoj Argentino, Ĉilio, Ekvadoro, ktp. La lando nomiĝas Runasimi en keĉua, kaj tiu estis la devena lingvo de la hispana verkisto Inca Garcilaso de la Vega, kiu verkis ankaŭ sialingve.

Tamen, la historio de la keĉua popolo estas tiu de subpremado. La hodiaŭa situacio de la lingvo estas hontiga: malpliigo da scipovantoj, manko da teĥnikaj vortoj, diskriminacio en lernejoj,...

Se nun la keĉua lingvo pluvivas estas ĉefe dank'al la hispanaj misianoj (precipe jezuitoj) kiuj lernis ĝin por kristanigi la keĉuanojn, malgraŭ la malpermeso de la hispana regnestro. La Reĝa Dekreto de Majo de 1770 suskribita de Carlos III<sup>a</sup> diras: "...oni atingu la malaperon de la malsimilaj linvoj kiujn oni parolas en miaj teritorioj kaj oni parolu nur la kastilian...". Sed por forigi lingvon necesas forigi la popolon kiu ĝin parolas.

La keĉua apartenas al la familio de aglutinaj lingvoj, en kiuj la vortoj konsistas ĉiam el neŝanĝeblaj radikoj al kiuj aldoneblas partikuloj kiuj indikas la gramatikajn rilatojn. Aliaj kuriozaj karakteroj estas ke la lingvo ne havas definitan artikolon; la vorto "ni" posedas du formojn: "ñoquanchik" (kiu inkluzivigas tiun kiu parolas) kaj "ñoqayku" (kiu ekskludas parton de la parolantaro); la verboj indikas per ili mem la subjekton kaj la objektojn: "Munayki" (Mi amas vin) = "Ñoqa (mi) qamta (vin) munayki (amas)"; la lingvo ne posedas tro da radikoj, ekzemple la vorto "Waqay" (plori) esprimas ankaŭ la kantojn de ĉiaj bestoj, sed, tamen, la verbo "takii" (kanti) uzeblas nur por homoj; la vorto "ami" posedas en keĉua tri tradukojn: "munay" (sensuala deziro), "kuyay" (korinklino - ekzemple al patrino) kaj "waylluy" (amo - ekzemple geedza).

Tamen, por ni, eble la plej stranga karaktero estas la ekzisto de guturalaj sonoj kiujn oni nur malfacile povas prononci. Ĉi tiuj sonoj havigas al la lingvo apartan "aspekton".

Nuntempe, la lingvo posedas tri ĉefajn dialektojn, tiujn de Cuzco, Ayacucho kaj Chichaysuyu.

En la hispana lingvo ekzistas vortoj kiuj devenas el la keĉua: "cón - dor", "pampa", "guano", "puma",... Sed kompreneble estis multe pli granda la influo de la hispana en la keĉua: "zapatu", "caballu", "dejay", "calle", "esquina",... Kiel ekzemplo, en la jena teksto el la verko "Catecismo Bilingüe", rimarku ke nur la du unuaj vortoj ne estas hispandevenaj: "Kamp-tam, Tayta Jesucristo, adorakullak, cruzniquihuan salvamenkequipita".

Juk kutis china puma orqupunawan kupertipanakurqa. China punas nin:

- Apu puma, ĵimanasqataq mana mayllakunkichu? Manam allinta asnanki, nispa.

- Qanmi mana allintaqa asnankichu, nispa orqu puma kutichikun.

Chayna kutipanakuptinku, mayqen cheqampi asnasqanta mana yachakunchu. Chayysi ña iskaynin pumakuna jaspinakuyta munachkaptin, juk asnu rikurirqamun. Orqu puma qawaruspa nin:

- Wakmi niwasun pim mana allin asnasqanta.

Jinaspa jutkalla waqyayta qallaykun, asnutaq manchamanchaylla allillamanta asuykamun, iskaynin rinrinta jatari-chispa. Ña qayllankupiña kaptintaq, orqu puma qawarayaspa tapun:

- ĴPim mama allinta asnan? ĴPaychu ño qachu?

Asnu, apukunap qayllampi, cheqanta rimayta munaspa, asnu jina orqu pumata nin, ukullanmanta qawaspa:

- Qanmi taytay, apuy, mana allinta asnankichu, nispa.

Manaraqpas asnu rimayta usiachkaptin, orqu puma wañurachin.

Jinamtaqa, musuqmanta anyanakuyta qallaykunku.

Chayna kachkaptinkus juk ataq rikuramun. Orqu puma rikuruspa nin:

- Wakmi cheqanta niwasun, nispa.

Chaypaqtaq, silluntin makinwan qayan. Ña qayllampi kaptintaq tapun:

- ĴPim mana allinta asnanchu, paychu ño qachu? nispa.

Atoq qawasqaña asnuwan rurasqanta, chaymi payqa, mana wañuyta munaspa, iskaynin apunkunata qawaspa, manchasqa, ullpusqa, chaka kunkawan kutichin, kay nispa:

- Apuykuna, manam niita atipaykichikmanchu, pi aswan asnasqanta. Chulliwani mi kachkani.

Oni diras ke iujoje leonino kverelis kun leono. La leonino diris al li

- Forta leono, kial vi ne laviĝas? Vi ne odoras bone.

- Vi estas tiu kiu haladzas, kontraŭ diris tuj la leono.

Tiel ili kulpis unu la alian, tamen atingante scii kiu el la du haladzis. Ili jam montris reciproke la detojn kaj swingis siajn ungojn kiam ekaperis azeno. Vidante lin, la leono diris:

- Tiu diros al ni kiu haladzas

Por tio li vokis ĝin aŭtoritate, kaj la azeno iom post iom alproksimiĝis time kaj malrapide, levante la orelojn pro miro. Kiam li troviĝis antaŭ la regnestroj, la leono demandis al ĝi okulumante:

- Kiu haladzas, ĉu mi aŭ ŝi?

La azeno, dezirante diri la veron antaŭ siaj regnestroj, kiel bona azeno, respondis:

- Vi, patro kaj moŝto, estas tiu kiu haladzas.

Kiam ĝi apenaŭ ĉesis paroli, la leono mortigis ĝin.

Tiam tuj denove komencis la kverelo.

Dume aperis vulpo kiu rigardis senkonfide el la malproksimo. Vidante ĝin la leono diris:

- Tiu vulpo finfine diros al ni la veron.


Por tio, li vokis ĝin levante piedon de akraj ungoj, kaj kiam ĝi atingis ilin, la leono demandis:

- Kiu haladzas, ĉu ŝi aŭ mi?

La vulpo jam estis vidinta tion kio okazis al la azeno, kaj li ne volis havi la saman sorton. Tial, dum li rigardis timeme kaj honteme ambaŭ regnestrojn, diris per mallaŭta voĉo:

- Miaj regnestroj, mi ne povas diri al vi kiu el vi plej haladzas ĉar mi kataras.

Kusi Paukar



## INTERVJUO

La pasintajn 13-an kaj 14-an de Decembro vizitis nin samideano Billy R. Waldon, el Tahlequah (Usono). Jen kelkaj rimarkindaĵoj el niaj konversacioj kun li.

- o - o - o - o - o - o - o -

NIA VOĈO: Verŝajne vi multege vojaĝis.

Ĉu vi ĉie trovis la utilecon de E-o?

Billy: Jes, E-o estas tre utila. De 2 jaroj mi loĝas en ŝipo, ĉar mi laboras en N.A.T.O., en la usona mararmeo, kaj en ĉiuj havenoj al kiuj mi iris mi trovis samideanojn. Precize mi estis ĝis nun en Koreujo, Aŭstralio, Filipinujo, Tajlando, Kenio, Japanio, ... kaj en ĉiu lando mi trovis esperantistojn pere de Jarlibro. Nun mi daŭre loĝas en Napolo (Italio) kaj mi ĉeestis la ĉijan italan kongreson en la urbo Mancedonia. Ĉar mia ŝipo nun estas en Barcelono, mi kelkajn tagojn restis en tiu urbo kaj mi venis en Madridon por nur du tagoj.

NIA VOĈO: Laŭ niaj scioj, Usono ne estas la plej taŭga loko por la disvastigo de E-o, ĉar la oficialaj medioj apogas la anglan kiel internacian lingvon kaj la usona popolo ne ŝajnas tro konsciiĝinta pri la lingvaj problemoj. Tamen, ĉu E-o disvolviĝas bone en Usono kaj ĉu oni vidas ian apogadon far la estraroj?

Billy: Antaŭ 10 jaroj E.L.N.A. (Esperanta Ligo por Norda Ameriko) havis nur 500 membrojn, sed nun ĝi nombriĝas pli ol 1000 anoj. Tio ne ŝajnas

granda antaŭeniĝo, sed ne ĉiuj usonaj E-istoj estas ELNAanoj, kompreneble. Ekzemple, nun en la urboj Chicago, San Diego kaj Los Angeles ekzistas tre grandaj E-grupoj. Krom tio, en Nov-Jorko fondiĝis oficejoj de UEA, kaj la grupo el Vaŝingtono sendis al ĉiu registarano kaj kongresano pakadon kun informoj pri la lingva problemoj.

Rilate al la dua demando, nia devas rekoni ke ni havas preskaŭ nian oficialan apogon. Tamen, Prezidento Carter sendis leteron al la lasta kongreso de ELNA, atentigante ke li tre favoras la ideon de E-o. Tio povas ne signifi troe, ĉar li eble sendas tiajn leterojn al ĉiuj kongresoj kiuj okazas en Usono!

NIA VOĈO: Vi apartenas al la ĉeroka etno. Ĉu vi ne opinias ke E-o povas esti komunikilo eĉ ene de la sama lando, ĉar vi sentas diskriminigitaj kiam vi parolas angle kun denaska anglalingvano?

Billy: Jes, tion precize ni pensas. Ĝis antaŭ nemulte oni punis nin se ni parolis nian ĉerokan lingvon. Mia urbo estas kvazaŭ la ĉefurbo de la ĉerokeco, kaj malgraŭ ĉiu puno ni daŭris parolante ĉeroke kun niaj familioj, en la lernejo, ktp. La celo de la mia urba klubo estas konsciigi la homojn pri tio ke lingva diskriminacio okazas ne nur inter ŝtatoj, sed ankaŭ ene de la sama lando kaj eĉ ene de la sama urbo!



**PROKSIMAJ AKTIVAĴOJ.**

25-an de Februaro (8<sup>a</sup> vespere)

Projekciado de lumbildoj pri Tailandio, kun komento en Esperanto de Juan Carlos Ruíz Sierra.

4-an de Marto (8<sup>a</sup> vespere)

Prelego en Esperanto pri la Esperanta literaturo. Parolos: Augusto Casquero.

11-an de Marto (8<sup>a</sup> vespere)

Prelego en Esperanto pri la Monda Turisma Konferenco, okazinta en Manilo (Filipinujo). Parolos: Gian Carlo Fighiera.

15-an de Marto (horo anoncota)

Ekskurso al la montaro La Pedriza de Manzanares el Real.

Augusto Casquero de la Cruz

(Prezidento de M.E.L.)



## SKRIBAS LA MORTINTO

Mi skribas al vi leteron el mia umbrolando.  
Ĝis tie ĉi alvenas viaj malproksimaj eĥoj.  
La tero multe pezas kaj jam rompis la ĉerkon  
kaj metita en la ripoj malpropran oston mi havas.  
Ni ĉiuj trankvile putriĝas ĉi tie.  
Por longa tempo ankoraŭ, la vermoj havos manĝon,  
ĝuste nun ili marŝas feliĉaj sur la letero:  
mi permesas al ili paŝtadi laŭ ilia plaĉo  
ĉar, finfine, tiam, kiam ni neniĝos,  
ili ĉiuj restos mortontaj sur mia nuda skeleto.

Kaj, bone, kiel mi diris, mi skribas al vi leteron:  
mi esperas ke vi bonfartos kiam vi ĝin ricevos.  
Rilate al mi, ĉar mi estas mortinto, ĉi tie mi putriĝas,  
kaj, cetere, l'aferoj daŭrigas kiel ĉiam.  
Estas eble ke vi min eĉ jam ne rememoras:  
mi, kiam mi vivis, estis justa juĝisto  
kaj nun..., ĝusta mortinto ekde preskaŭ unu jaro.

Se, alvenante Aprilo, vi vidos papilion,  
ne al ĝi diru, aŭ diru al...bone, se ne, eĉ plej bone nenion...

Ne vi sentiĝu timemaj veni kiam vi devus  
ĉar, finfine, ĉi tiu loko estas trankvila:  
ĉi tie ĉiu silento estas vera silento,  
ĉiaj aĵoj havas sian ĝustan mezuron,  
oni lernas sciigojn neeblaj por rakonti...  
Esti sola ne gravas, estas kutima afero  
kaj vi mem vidos, kiam via vico alvenos.  
Sed, antaŭ ol vi venos, lasu ĉion en ordo  
ĉar poste, estas turmento memori la erarojn.  
Pro tio ĉi, mi volus, se papilion vi vidus,  
ke vi diru al ĝi ke mi..., sed ne, bone, ĝin lasu...  
Kaj nun, mi vin adiaŭas: oni malbone vidas  
(mi skribas per la fingro trempanta en la ventraĉo).  
Se vi volus respondi, vi scias kie mi estas.  
Vi ĉiuj bonfartu. Sendas al vi salutojn via amiko Filipino.

José F. Arroyo  
(El la neeldonita libro "Homoj kaj paraboloj")

Henri Matisse estas la plej grava reprezentanto el la "fauvismo", pentrarta movado naskiĝinta en Francio je la fino de la XIX<sup>a</sup> jarcento, konsistiĝinta el aro da junaj artistoj sen preciza teorprogramo kaj kunigintaj per nova aspekto pri la spaco.

La Fondaĵo Juan March, faris ekspozicion pri 64 artaĵoj apartenantaj al tiel fama artisto.

Jen estas kelkaj de ĝiaj nomoj.

Pentraĵoj: "Nutraĵaro kun fruktoj kaj boteloj" (1896); "La haveno de Abail" (1905); "La muziko" (1907); "La lila branĉo" (1914); "Hispana virino" (1917); "Internajo kun violonskatolo" (1918-19); "Pluvegado en Niza" (1919-20); "Meditado (post banado)" (1920); "Nublua" (1952).

Desegnoj: "Nuda virino sidanta" (1940); "Portreto de Fabiani" (1943); "Baudelaire-La hararo" (1944).

Skulptaĵoj: "Kvar nudoj el bronzo" (1909-30).

Libroj: "Ĵazo" (1947); "Antologio pri la amoj de Ronsard" (1948).

Nomita per la nomo de "fauve" (sovaĝbesto) kune kun siaj kamaradoj, Matisse interesiĝas precipe pri la multfoje ondoforma kaj arabeska linio, simpligante la desegnon, kaj pri la vivaj koloroj.

Unu el siaj preferitaj temoj estas danco, per kiu li esprimas, kiel en ĉiuj pentraĵoj, sian feliĉon.

Per la burĝaj internaĵoj kaj mortintaj naturoj kun oranĝoj, ostroj, anemonoj... esprimas la gajecon de la vivo kaj sian karakteron feliĉe pagana.

Oni ne povas interpreti la artaĵon kvazaŭ ion senviva kaj objektiva. Interne de ĉiu el ili, es-

tas multe pli ol simplaj koloroj kaj desegnoj enmetitaj je plimalpli aranĝita maniero. Tie ekzistas io viva: la sentoj de homo kiu esprimas tiamaniere tion kion li sentas.

Por kompreni Matisse-n, oni bezonas aŭskulti la aŭtoron mem: "La kunmetado estas la arto kiu aranĝas je dekoracia maniero la malsamajn elementojn kiujn disponas la artisto por esprimi siajn sentojn". Tio estas vere grava, ĉar ĝi montras la internan mondon el la artisto.

Iu diris ke interpreti estas ŝanĝi. La interpretado estas kunigita al la imago; kaj sen fantazio nek sensiveco, la artisto estas nenio. Pri kio utilis al la artisto "kopii" ĝuste same tion kion li vidas sen enmeti ion propran? Sen dubo, ni vidus ion malvarman, senaniman, kaj eble ni pensus ke io mankas al ĝi.

La pentraĵoj de Matisse estas plenaj de esprimeco, kaj ĉi-tion signifas "komuniko". Kelkfoje, kiam ni estas kun iu kiun ni amas, nur rigardo aŭ gesto sufiĉas por kompreni ekzakte tion kion li sentas, kaj ni ne bezonas vortojn por interkomunikiĝi. Same okazas kiam ni aŭskultas simfonion, kontemplas pentraĵon aŭ iun ajn artaĵon kiu havas tiun specialan forton por penetri en la plej profundan parton de nia animo kaj estigi al ni ĝojon, melankolion, trankvilecon, malesperon...

Kreante, la artisto konsumiĝas iom post iom forlasante tie parton de si mem, sed samtempe li renaskiĝas denove en sia artaĵo por vivi eterne, restante tiamaniere la homo, glore senmortigata.

Nati

## ĈU EN TOMBEJO?

Dum tie vi staris en nigra mantelo  
Kaj ĉerkon en foson aŭskultis degliti,  
Ĉu brilis la suno? Ĉu bluis ĉielo?  
La tombon neniam mi volas viziti.

Sur tombo violojn vi ŝutis kun ploroj,  
Kaj iu kun rozoj vin iris imiti.  
Mi dankas, amikoj, pro larmoj kaj floroj;  
La tombon mi tamen ne volas viziti.

Eksidas la vintro, dum falas arĝento,  
Sur krucoj granitaj por longe mediti;  
Kaj kantas la neĝo pri l'dolĉa silento.  
Eĉ nun mi la tombon ne volas viziti.

Ĉu flanke tombiĝas knabet' sub kolono?  
Ĉu viro maljuna? Ĉu aŭdas vi diri:  
"Jen tombo malriĉa, sen nomo, sen ŝtono"?  
Ho lasu! Mi tien ne volas aliri.

De kiam vi lasis la ĉerkon en tero  
Se l'tuta tombej' ne fariĝis pli bela,  
Pli gaja, pli riĉa je luma espero,  
Ŝin vane mi serĉus en tombo malhela.


Ne tie mi serĉos, sed kie ankoraŭ  
Ŝi vivas per amo kaj flego donitaj:  
Sur litoj suferaj, en ĝojo de l'koroj  
En dankaj okuloj, en manoj tenitaj.

Kaj tial ekfalu sur tombojn la neĝo,  
Aŭ brilu la suno kaj floru la floroj:  
Al ter' apartenas nek amo nek preĝo,  
Kaj ĉerkon nur venkas vivantaj memoroj.

# Nia

# voĉo

IV-A EPOKO



Madrida Esperanto Liceo

Atocha, 98 - 4<sup>o</sup>

Madrido-12 Tr : 2308798

N-0 7

MARTO - APRILO 1981

Kun granda honto pro la nekutime longa prokrasto, jen ni prezentigas al vi la sepan numeron de ĉi tiu epoko de nia revuo. Verŝajne la optimismo kaj entuziasmo kiuj evidentiĝis en la etoso de la lastnumera ĉefartikolo ie kaŝiĝis kaj malaperis, ni konsideris ke nia legantaro ja bezonas kaj meritas klarigon kiu tamen ne estu blinda senkulpiĝo.

Unuafoje dum pluraj monatoj, NIA VOĈO ne nur ne aperas la 15an de la monato, sed ankaŭ ĝi kunigas du monatojn en nura kajero. Kelkaj okazaĵoj estigis tiun bedaŭrindan fakton. Ĉe la redaktantaro troviĝas kialoj studaj kaj laboraj (se ni ne parolu pri la emociaj - ni ja ne estas ŝtonoj!) pro kiuj al ni jam ne plu estis eble - almenaŭ ĉifoje - aperigi la revuon akurate. Krome, kelkaj el ni demandas al si mem ĉu ni faras utilan laboron, ĉu la legantoj legas, rutine trafoliumas aŭ tutsimple ĵetas en paperkeston NIA VOĈOn. Verdire, ĝia sukceso lastatempe evidentiĝis pli ekster Madrido ol en la Liceo mem: ni ricevis gratulojn de pluraj aliaj kluboj kaj asocioj, kaj eĉ petojn por ke redaktantaranoj de la revuo fariĝu ĉefredaktantoj de la malforta HEJSA bulteno. (Parenteze, la reagoj al la sekcio pri minoritataj kulturoj ne aŭdiĝis tro laŭte en la Liceo, sed ja jes en aliaj leteroj kiuj nin atingis. Kial? Ĉu madridanoj ne interesiĝas pri tiuj temoj?). Plie, multe ĝojigis nin la ekapero de BULTENO, pro la kialoj kiujn vi trovu ĉe nia januara ĉefartikolo.

Tial ni bedaŭras nian nunan situacion des pli post la progresoj kiujn ni evidente faris: plialtigo de la intereso, plibonigo de la teĥnika aspekto kaj de la lingvo, ... tiuj ne estas memlaŭdaj vortoj niaj, sed viaj; surprizigis nin, ekzemple, kiel post nur kelktaga prokrasto tuj kelkaj liceanoj venis demandi nin pri la kialoj de la malakurateco, tiel kuragiĝante nin pli kaj pli. Krome, ni jam ne plu havas la problemon de manko de artikoloj (kiu tiel multe priokupis nin dum la unuaj monatoj), kaj nun eĉ povas eĉkti ĉar unuopuloj daŭre sendas al ni verketojn kaj novaĵojn, kaj ĉar ni povas rikolti ampleksan materialon el "Parolataj Gazetoj"; sed restas nefarita la plej grava laboro: oficeja, t.e., tajpado. Se iam oni kulpis nin - eble prave tiutempe - pri grupfermeo, ni nun troviĝas pli malfermitaj ol iam antaŭe troviĝis iu ajn grupo.

Sed gratuloj, laŭdoj kaj kuragiĝoj solaj, bedaŭrinde, ne faras revuon. Estas do ni tiuj kiuj (laŭ niaj ebloj, volo, scioj kaj devigoj al la liceanaro) devos decidi pri la estonto de NIA VOĈO, almenaŭ dum la nuna epoko. Ĉu ni faros regule dumonatan revuon, ĉu ni renormaligos la enhavon kaj la aperigadon aŭ ĉu ni tute lasos la redaktadon, tio ankoraŭ estas nekonataĵo eĉ al ni. Vi sciu, estas treege malfacile eĉ nur kunigi tutan teamon de nur ses membroj por pritrakti ĉion ĉi - tiel ni estas okupataj. Sed tamen ni klopodos sciigi nian decidon al vi kiel eble plej baldaŭ.

#### LA REDAKTANTOJ

##### REDAKTANTOJ

Raúl R.  
M. Angel Sancho  
José Luis García  
Concha Sanz  
Santiago del Pino  
Natividad Millán

##### DESEGNISTOJ


José Luis García  
Natividad Millán  
Fco. Javier del Pino

##### KROME, KUNLABORIS EN ĈI TIU KAJERO

José F. Arroyo  
LKK de Hispana Esperanto Kongreso 1981

##### RIMARKO DE LA REDAKTANTOJ

Pri la enhavo de la kunlaboroj respondecas nur la aŭtoro mem. La redaktantoj esprimas sian opinion nur en la ĉefartikolo.









## ĈU UTOPIO?

Kaj ni tiel daŭrigas, nelaceblaj,  
la feliĉon serĉantaj tra la steloj,  
tra la strangaj teorioj neegaleblaj  
konstruantaj la turon de niaj revoj.  
Ĉar ankoraŭ ni revas kaj ni kredas  
kaj ni obstine esperas senpacience.  
Ne estas sufiĉe al ni, kion ni posedas:  
ion alvokas nia kor' intense.  
Ia paco alvokas nin, la libereco,  
amo sincera en la homar', laboro,  
sanespireblaj ventoj de justeco  
kiuj igis kanti ĝoje nia koro.  
Ia turo de niaj revoj leviĝas  
super libera kaj senlima mondo  
en kiu la homaro renkontiĝas  
en tutkolora kaj frateca rondo.  
Ĉu utopio? Ĉu neeblaj revoj?  
Ĉu ne ekzistas tuthomara kanto?  
Dum ekzistas la maro kaj la mevoj  
daŭrigu ni nian revon: Esperanto!



José F. Arroyo



## HISPANA ESPERANTO KONGRESO

La Kongreso okazos dum la tagoj 17a ĝis 22a de venonta julio. La sidejo por la Kongreso estos la Universitato de Murcia. Por la restado de la gekongresanoj ni disponas el la kolegio "Cardenal Belluga" kaj aliaj.

Sed en Murcia ekzistas granda kvanto da hoteloj kaj gastejoj kiuj estos "liberaj" en tiuj tagoj. Do, la restado ne estos problemo. Logike, la prezoj de la kolegioj estos pli malmultekostaj. Tiuj kolegioj havas du litajn kaj trilitajn ĉambrojn. Se vi volas gastigi tie, bonvolu informi nin kiel eble plej rapide.

La nuna provizora programo por la Kongreso estas tiu ĉi:

Vendredo (17 julio). - Akcepto de la gekongresanoj kaj disdono de la dokumentoj.

Interkona vespero.

Sabato (18). - Ekzamenoj.

Kunsido de la estraro de H.E.F. kaj delegitoj de grupoj.

Solena inaŭguro de la Kongreso.

Oficiala fotado.

Vizitoj al fabrikoj.

Prelego en Esperanto.

Dimanĉo (19). - Meso kaj prediko en Esperanto.

Ebla inaŭguro de strato "Esperanto".

Elmontrado de la folkloro dan-  
cado.

Arta vespero.

Lunĉo kun pastetoj kaj mal-  
varmaj trinkaĵoj.

Mardo (20). - Tuttaga eks-  
kurso tra la "Malgranda Ma-  
ro" kun tagmanĝo.

Projekcio de Esperantaj Fil-  
moj.

Mardo (21). - Fakaj kunvenoj:  
ILEI, Esperanto en la lerne-  
jo, didaktiko per kaj por Es-  
peranto, HEJS, k.t.p.

(Respondeculoj de fakaj orga-  
nizoj kontaktigu kun la O.K.K.  
por oficiale aperigi la kun-  
venon en la oficiala programo).

Ĝenerala Asembleo de H.E.F.

Vizitoj al Muzeoj.

Prelego en Hispana Lingvo.

Oficiala Bankedo.

Merkredo (22). - Duontaga  
ekskurso.

Solena fermo de la Kongreso.

Disdono de atestiloj.

Tiu ĉi estas la provizora  
ŝanĝebla programo.

La unua ekskurso havos ki-  
el scenejon la "Malgranda Ma-  
ro" kun ĝiaj tipaj vilaĝoj kaj  
vizito de la urbo "Cartagena"  
kaj la fama turisma konstruaĵa-  
ro de "La Manga".

La alia ekskurso, kun la daŭro de duontago okazos tra la regiono. Eblecoj viziti la "Museo de la Muerta" kaj la stranga araban aparaton de "La Rueda de la Ñora", akvu-milo por la frutĝardeno de Murcia, konstruita de la araboj dum sia okupado el la Duoninsulo.

La Organiza Komitato estas formata po:

Prezidanto: Antonio Serra Serra.

Vicprezidanto: Fco Miguel Muñoz Garre.

Sekretario: Florián Morales López.

Vicsekretario: José Manuel González Tovar.

Kasistino: Eduvigis Muñoz Garre.

Voĉdonantoj: José M<sup>a</sup> Bernabeu Franco.

Fco Jara Salinas.

Fco Javier Ortin Tovar.

Rosa M<sup>a</sup> Navarro González.

Puri Gallego Sánchez.

M<sup>a</sup> Carmen Tovar Moreno.



Kiel ni povas vidi, oni lasas sufiĉe da gravecon al la lernanto, kiu jam ne plu estas pasiva, por partopreni plene en sia propra instruado.


La tasko de la profesoro devas esti ĉefe helpi lin en sia memedukado per malpezaj indikoj. Krome li devas permesi la sendisciplinon en la klasejo ĉar, laŭ Tolstoj, ili mem komprenos finfine la bezonon de la normoj.

En lia lernejo ne ekzistas horaroj, temaroj, punkoj aŭ diplomoj: "la profesoro ekzamenista estas komerciisto".

Ankaŭ ne estas fiksj metodoj por instrui kaj la edukado devas fini neniam.

"Profesoro fremda el lia kvartalo estas ekspluatisto"; por eduki oni bezonas partopreni kun la popolo, ĉar eduki estas kunvivi.

Alia punkto de Yasnaia



Poliana estas ke li devas ankaŭ labori fizike por manĝi. Do, tiuj kiuj instruos, ĝin faros ĉar vere ĝatos tiun taskon.


Kvankam la klopodo de edukado tute libera de Tolstoj mal-

sukcesis en la praktika senco, oni devas kompreni la pozitivajn punktojn de lia doktrino, kelkaj el kiuj oni uzis por la postkreado de la teoreprogramo de la nova lernejo.

Farinte ĉiam racian kritikon, li laboris intense por trovi pozitivajn solvojn al la ekzistantaj problemoj.

Do, ni devas rekoni lian dediĉon, kaj amon de homo kiu vere zorgis kaj luktis pro io tiel grava kaj malfacila kiel la temo de la edukado.

Naci



## NEKROLOGO

La 7-an de februaro forpasis en Alicante nia kamarado Joaquín López Herrero, kiu estis kunfondinta membro de nia Asocio kaj estrarano.

Lia laboremo, la sincera siteno pri la maljustaĵoj sociaj kaj lia fervoreco por Esperanto estis iuj el la kvalitoj de nia kara kunbatalinto, kiuj metas lin en la plej altan kaj imitindan lokon.

Al lia vidvino, s-rino Julia kaj multnombra familio kaj amikaro, nian plej sinceran kondolencan.

-----

Ni rememoras per ĉi tiuj linioj al ĉiuj liceanoj ke L.L. Zamenhof forpasis en varsovio la 14-an de Aprilo de la jaro 1917.

# BULTENO

X

Socios

n./na

Domicilio:

Madrid -



## Difusión de la Cultura.

- Otras.....
- Dirección equivocada...
- Persona desconocida...
- Cambio de domicilio...

● Sr. Cartero ponga una X en la razón de la devolución:

Remite:

LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO  
c/ Atocha, 98  
Madrid - 12

Goma Goma Goma

== / MADRIDA ESPERANTO LICEO / Atocha, 98 / 4º etaĝo / Madrido - 12 / ==

### Karaj gelegantoj:

Tiu ĉi gazeto, kies celo estas nur servi kiel kontaktilo por ĉiuj membroj de M.E.L., konsistas el tri fakpartoj: loka, nacia, kaj aliloka. Ĉiumonate ni sendos la informilojn kiel eble plej rapide por sciigi, sufiĉe antaŭtempe, ĉiujn okazotajn aktivajojn en la Liceo.

La bulteno estas ĉies, kaj ĉiuj rajtas ĝin helpi. Bonvolu informi al la - daktanto pri iu ajn interesa afero kiuŝi konus, por sciigi ĝin al ĉiuj.

(Impresos)

## En Madrido:

**TEATEA VESPERO:** Vendrede, la 8<sup>an</sup> de majo, je 20<sup>o</sup> horo, la pola aktorino — Jadwiga Gibczynska prezentos en Esperanto fragmentojn el "La Eta Princo" de Saint-Empery. Poste, Liliana Paloczewska komentos lumbildojn sub la titolo "Tra Pollando"

**STRARVOKO:** Ĉar estas pli komforta labore por la sekretario, la straro petas de ĉiuj socioj kiuj povus tion fari, ke ili pagu banke. Tiamaniere, — oni esperas plibonigi kaj rapidigi la administrajn taskojn.

**VIZITOJ:** Jurnalisto de Pola Televido Roman Dobrzynski, kaj sia edzino Erika, Journalistino de la eksterlanda fako de Pola Radio, vizitis nian Liceon. Interesa dialogo okazis inter ili kaj la ĉeestintoj.

— 16<sup>o</sup> de Aprilo nin vizitis usonano kiu al ni parolis pri sia lando kaj aliaj interesaj temoj rilate la esperanto-movadon.

**KONVERSACIA RONDO:** Venontan 6<sup>an</sup> de majo ne okazos Parolata Gazeto. Ĝin — anstataŭos teatra vespero la 8<sup>an</sup> de tiu sama monato.

**STRANKUNVENO:** Eksterordinara strarkunsido okazis la 25<sup>an</sup> de Aprilo. En ĝi oni diskutis la gravecon veni la Liceon kiel eble plej ofte, por ke la laboro ne ŝarĝu ĉiam sur la ŝultroj de la samaj personoj. Ankaŭ, oni invitis al ĉiuj partopreni la kritikajn kunsidojn kiuj okazos de la 27<sup>o</sup> de Aprilo ĝis la 1<sup>o</sup> de Majo.

**NOVAJ KURSOJ:** Kvankam la propagando ne estis tro densa, komenciĝos novaj kursoj la unuan merkredon de Majo per informa parolado. Ĝi daŭros ĝis Julio kaj ni esperas ke ĝi estos sukcesa. La pasintakurso ne estis tro granda rilate la kvanton da gelernantoj, kvankam ĉiuj ili ricevis diplomon en finkursa festo.

— Esperanta kurso okazos en la Universitato de Santiago de Compostela (nur por instruistoj de baza lernado), dum Julio. Pliajn informojn kiujn ni ricevos, ni sciigos al vi.

## En Hispanio:

**NEKROLOGO:** Joaquín López Herrero, fondinto de Madrida Esperanto-Klubo, — nuntempe M.E.L., forpasis pasintan 7<sup>an</sup> de Februaro. Ni kondolecas kaj bedaŭras lian morton.

**NACIA KONGRESO:** En la aprila numero de "NIA VOĈO" aperis artikolon pri la venonta kongreso de Murcia, kun emetita aliĝilo. Se vi deziras pliajn informojn pri ĝi kaj/aŭ eĉ aliĝilojn, petu ilin en la Liceo.

**H.E.J.S.-a TENDARO:** En bela urbo Elche, okazis la ĉiujara tendaro de la junulara sekcio de H.E.F., kie oni diskutis gravajn problemojn de la junulara esperanto-movado en Hispanio.

**BOLETIN de H.E.F.:** La lasta numero de la revuo "Boletín", oficiala organo de H.E.F., aperis en Aprilo. Krom prikulturaj artikoloj, oni povas trovi interesajn informojn pri la venonta nacia kongreso kaj ĝian provizoran programon.



# BULTENO

X

Socio: 306

n./ne 40

Domicilio: \_\_\_\_\_

Madrid -



## Difusión de la Cultura.

- Otras.....
- Dirección equivocada.....
- Persona desconocida.....
- Cambio de domicilio.....

Gr. Cartera ponsa una X en la razón de la devolución:

Remite:

LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO  
C/ Atocha, 98  
Madrid - 12

Goma Goma Goma

== / MADRIDA ESPERANTO LICEO / Atoča, 98 / 4<sup>o</sup> etaĝo / Madrido - 12 / ==

### ENKONLUKO

Ĉi-numere, vi trovos novaĵon pri eksterordinara strarkunveno. Ĝi pritraktis la ĉiamajn problemojn de la Liceo, t.e. propagando kaj laboro. Nia plej grava - priokupo estas ke, kvankam ekzistas multaj socioj, ĉiam ĉio estas aranĝita de - malmultaj.

Do, ĉiuj estas invitataj komuniki sian opinion, kaj kritike dialogi en la - specialaj kunsidoj pri tiuj ĉi temoj, por trovi baldaŭan kaj bonan solvon.

Alia afero estas ke vi jam ne trovos internacian sekcion en "Bulteno". Al - ni mankas sufiĉa loko por bone informi. Tamen, la loka kaj nacia sekcioj estos

**LOKE:**

**PRELEGOJ:** Jaŝdon, la 4<sup>an</sup> de Junio, je la 20,30<sup>o</sup> horo, prelegos sinjoro - Duncan Charters pri la temo "Usono en Perspektivo". Li ankaŭ al ni parolis pri esperantaj instrumentoj, pasintan 20<sup>an</sup> de Majo

**VIZITO:** Roberto Odilon Horta, prezidento de Junulara Esperanto-Grupo - de Rio de Janeiro, vizitis Madridon pasintan monaton.

**OKAZINTAĴOJ:** Pasintan 8<sup>an</sup> de Majo, kiel anoncote, Jadwiga Gibczyńska ludis "La Etan Princon" de Saint-Exupéry. Liliana Palczewska poste legis kvin leterojn.

**PROJEKCIO:** Liliana Palczewska, la 5<sup>an</sup> de Junio, komentis lumbildojn - sub la titolo "Tra Pollando"

**ESTRARKUNSIDO:** Venontan 3<sup>an</sup> de Junio okazos estrarkunveno laŭ la jena tagordo: 1. Legado kaj aprobo de la lasta akto. 2. Financa situacio. 3. Programado de la somera kurso.

**ORDINARA KUNVENO:** Por ĉiuj kiuj deziras ĉeesti la nacian kongreson de Murcia, okazos la 17<sup>an</sup> de Junio. Bonvolu ne decidi vian partoprenon en la lasta momento. Tio faciligos la aranĝon de la ekskurso.

**EKSKURSO:** 27<sup>an</sup> kaj 28<sup>an</sup> de Junio la Liceo organizos ekskurson al "Cañón del Río Lobos" kun tendumado.

**DATREVENO:** La 28<sup>a</sup> datreveno de la fondiĝo de la Liceo okazos la 1<sup>an</sup> de Julio. Omi intencas organizi teatraĵon, dancon, komunan manĝadon, kaj omaĝon al iu elstara membro de nia klubo

**nacie:**

**SEMINARIO:** Internacia sminario pri "Monda Ekonomio/ Laboraj Postenoj por la Juneco", okazos en Strasburgo (Francio) de la 30<sup>an</sup> de Majo ĝis - la 6<sup>an</sup> de Junio. La kotizo estas 3.000 ptj kaj ĉiuj gejunuloj malpli - aĝaj ol 30 jaroj ricevos subvencion el TEJO. Ĉiuj kiuj deziras partopreni la aranĝon rapide telefonu al H.E.J.S. (93) 240.26.62.

**RENKONTIĜOJ:**

- Pasintan 24<sup>an</sup> de Majo okazis la Valencia Renkontiĝo en Calpe.

- De la 18<sup>an</sup> ĝis la 21<sup>an</sup> de Junio, organize de la Esperanta Grupo de Bilbao, okazos Internacia Esperantista Renkontiĝo. Tiun aranĝon organizas la grupo pro la 75<sup>a</sup> datreveno de sia fondiĝo.

**NACIA KONGRESO:** Se vi ankoraŭ ne aliĝis tiun kongreson, vi jam devos pagi pli altan kotizon. Aliĝiloj estas preneblaj en la Liceo.

**ALIE:**

**ESPERANTISTA KULTURDOMO:** Ĉi tiu institucio organizos aranĝojn de la 2<sup>an</sup> de Julio ĝis la 2<sup>an</sup> de Septembro. Ili estas interesaj por perfektigi - la esperantan nivelon per malalta kosto. Pliajn informojn petu de "Esperantista Kulturdomo", Kastelo Grésillon F- 49150 Baugé (Francio).

# BULTENO

X

Socio: 306

N./Na

40

Domicilio:

Madrid -



## Difusión de la Cultura.

- Otras.....
- Dirección equivocada...
- Persona desconocida...
- Cambio de domicilio...

● Sr. Cartero ponga una X en la razón de la devolución:

Remite:  
 LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO  
 c/ Atocha, 98  
 Madrid - 12

Goma

Goma

Goma

== / MADRIDA ESPERANTO LICEO / Atocha, 98 / 4ª etaĝo / Madrido - 12 / ==

### Rubriko:

Kiam lernanto vizitas la Liceon kaj demandas pri la utilo de la Internacia — Lingvo, ni ĉiam informas al li pri la intereso ferii per Esperanto pli malmultekoste kaj amike.

Ni devus sekvi niajn proprajn konsilojn kaj ankaŭ turisti esperante. Paroli — Esperanton al personoj kiuj ne komprenas nian denaskan lingvon, konante samtempe aliajn landojn, estas interesa kaj grava afero.

Komprenoble, ekonomiaj aferoj malebligas tiun esperantan agadon, sed se vi povas, feriu esperante. En la Liceo vi trovos kalendaron pri esperantaj aranĝoj, — kaj certe vi en ĝi trovos iun ajn kiu al vi plaĉas.

(Impresos)

### LOKE:

**EKSKURSO:** Pasintajn 27<sup>an</sup> kaj 28<sup>an</sup> de Junio organizo de la Liceo, okazis ekskurso al "Cañón del Rio Lobos". Laŭ la opinio de kelkaj el la partoprenantoj ĝi estis tre amuziga. Ni esperas ke aliaj ekskursoj estos organizataj venontan monaton.

**FESTO:** Ĉar la Liceo atingis la 28<sup>an</sup> datrevenon de sia fondiĝo, ĉiuj socianoj festis amike kaj amaĝis la samideanon Gansó pro sia senlaca laboro por Esperanto, pasintan unuan de Julio.

**EKSTERAJ RILATOJ:** En Televido, niaj samideanoj G.C. Fighiera kaj A. Casquero partoprenis en la programo Crónica 3 pasintan 30<sup>an</sup> de Junio. Ankaŭ al ni oni informis ke en tiu sama semajno la programo "A dos velas" dissendis raporton pri Cheste, vilaĝo kie la plejparte el la loĝantoj parolas Esperanton.

—————→ En Radio, J.C. Ruiz kaj M.A. Sancho, parolis pri Esperanto en la programoj "Aria 15", la 30<sup>an</sup> de Junio, kaj "Fin de Semana", la 4<sup>an</sup> de Julio.

**NOVA KURSO:** La duan de Julio komenciĝis nova kurso. Ĉar la kvanto da ĝenernantoj ne estas alta, nur oni organizos unu klason. La kurso estos ĉiutaga, ekcepte merkredoj, kaj daŭros la tutan monaton. La instruisto estos M.A. Sancho. Venontan monaton ankaŭ oni organizos kurson.

**VIZITOJ:** La lastajn tagojn de Junio, vizitis nian Liceon polino, brita kuracisto kaj eĉ du samideanoj el Bilbao.

### nacie:

**NACIA KONGRESO:** Finfine ni ricevis kelkajn informojn el la L.K.K. de la venonta Nacia Kongreso de Esperanto. Pri la nomoj de la hoteloj kaj hostaloj vi povas demandi en la sekretario de la Liceo. La nura kosto — kiun ni konas apartenas al Studenta Restadejo: ĉiutaga manĝado kaj loĝado kostos ĉe 1.000 pesetoj po tago. La Liceo deziras organizi vojaĝon al ĝi.

**RENKONTIĜO:** La Internacia Esperantista Renkontiĝo okazita, kiel anoncinte, pasintan monaton en Bilbao estis, laŭ informoj kiuj atingis nin sukcesa kaj fruktodona.

### ALIE:

**BRITA KONGRESO:** Niaj samideanoj Gian Carlo kaj Ada Fighiera estis gastparolantoj dum la pasinta 65<sup>a</sup> Brita Kongreso de Esperanto okazinta en Harrogate.

**UNIVERSALAJ KONGRESOJ:** Ni denove rememorigas al vi ĉiuj ke aliĝiloj por la venonta U.K. estas preneblaj en la Liceo. Ankaŭ ekzistas por la Junulara Kongreso. U.E.A. kaj T.E.J.O. organizas flugvojaĝojn al ili.

**LABORO:** U.E.A. serĉas novan oficiston. Oni bezonas kapablon paroli Esperanton. La salajro estos interkonsentita. Vi povas peti pliajn informojn en la Liceo.



# BULTENO

X

Socio: \_\_\_\_\_

D./Da \_\_\_\_\_

Domicilio: \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

Madrid - \_\_\_\_\_



## Difusión de la Cultura.

(Impresos)

- Otras.....
- Dirección equivocada...
- Persona desconocida...
- Cambio de domicilio...

● Sr. Cartero ponga una X en la razón de la devolución:

Remite:  
 LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO  
 C/ Atocha, 98  
 Madrid - 12

Goma

Goma

Goma

== / MADRIDA ESPERANTO LICEO / Atocha, 98 / 4ª etaĝo / Madrido - 12 / ==

### Rubriko:

Car vi ricevas ĉiunonate ĉi tiun bultenon, vi estas membro de nia Liceo. Sed partopreni la Esperanta Movado ne nur estas agi loke. Ankaŭ en nia lando ekzistas organizoj kiujn vi novas helmi, mone kaj labore, kiel H.E.F. kaj H.E.J.S.

La enkonduko de Esperanto en ĉiujn mondajn instancojn estas rektata de U.E.A. Vi novas donaci al ĝi monon, aŭ simple ĝin aboni. Servontuloj estos bonvenataj en la Centra Oficejo de Antverpeno.

## oficiala informilo de *m.e.l.* \*

MADRIDE... MADRIDE... MADRIDE... MADRIDE... MADRIDE... MADRIDE...

Vizitoj: Dum la someraj monatoj, la Liceo akceptis grandan kvanton da eks-terlandanaj vizitantoj. Kvar-dek poloj revenantaj el la Universala Kongreso estis la unuaj. A. Grzebowski, prezidento de la turisma agentejo *Juven-tur*, kaj Ewa Kuligowska, Mariam Dobrzynski kaj J. Grum el la estraro de - Pola Esperanto-Asocio, estas kelkaj el la plej elstaraj.

→ Aliflanke, ni ricevis la viziton de Norberto Saletti, direktoro dela revuo "Koncize", kiu ankaŭ partoprenis la Hispanan Kongreson en Murcia. Ankaŭ estis kun ni hungaro Hindeg Sándor, kaj City Makouii el Irano, kiu restos en nia urbo ĝis la fino de la monato.

Konversacia Rondo: Ni informas por ĉiuj revenantoj el la ferioj, ke la "Parolata Gazeto" daŭrigas funkciante ĉiumerkrede de la 8,30 ĝis la 10. - Gesinjoroj Fighiera direktas ĝin.

Estarkunveno: Venontan merkredon, 2<sup>an</sup> de septembro, okazos estrarkunvido. Kiel vi jam scias, ĝi ne okazis dum la du lastaj monatoj pro la ferio. — Do, se vi havas iun ajn ideon rilate al la Liceo, nun estas la oportuno — ĝin proponi.

Seminario pri sportoj: Jam oni komencas labori pri la projekto organizi — internacian seminarion pri sporto. La ideo naskiĝis dank'al ĝenerala de-ziro profiti la okazaĵon en Hispanio de la venonta monda futbolkampioneco.

NACIE... NACIE... NACIE... NACIE... NACIE... NACIE... NACIE...

H.E.J.S.: La venontan numeron de la oficiala organo de la Junulara Sekcio de H.E.F. oni redaktos en la Liceo. La redaktoro petas ĉies helpon — kaj apogon. Pliajn informojn kaj detalojn petu al M. Angel.

Koncize: Post nelonge la Hispana Esperanto-Junularo havos paĝon en la fama internacia gazeto "Koncize". Ni esperas ke ĝi estos bona ilo por la — plialtigado de la Juna Movado en Hispanio.

Kongreso: La XLI<sup>a</sup> Hispana Kongreso de Esperanto okazis, kiel anoncote, en Murcia. Kvankam ni ankoraŭ ne havas sufiĉajn informojn, ni jam povas al — vi komunike<sup>ks</sup> la venonta okazos en Málaga.

INTERNACIE... INTERNACIE... INTERNACIE... INTERNACIE... INTERNACIE...

Ekspozicio: La E-klubo "Starto" (121355, USSR, Moskvo, a/k 416) petas materialon por organizi ekspozicion pri "Aŭtoj, vojoj, pontoj, flughavenoj, — trafikajoj, voja tektiko de la mondo". Ankaŭ oni organizos letervesperon, do, validas iu ajn salutkorespondaĵo.

Universala Kongreso: La 67<sup>a</sup> Universala Kongreso okazos en Antwerpen, Belgujo. La Internacia Junulara Kongreso okazos en Leuve, en tiu sama lando. En la Liceo ekzistas la projekto organizi vojaĝon al ili.

Rimarko... Rimarko... Rimarko... Rimarko... Rimarko... Rimarko... Rimarko...

Literatura Konkurso: Ni rememoras ke la ricevado de originaloj por la 3<sup>a</sup> Literatura Konkurso de M.E.L. finiĝos en oktobro. Urĝu vin!



(Impresos)

Socio: \_\_\_\_\_

D./Da \_\_\_\_\_

Domicilio: \_\_\_\_\_

Madrid - \_\_\_\_\_



## Difusión de la Cultura.

- Otras.....
- Dirección equivocada..
- Persona desconocida..
- Cambio de domicilio..

● Sr. Cartero ponga una X en la razón de la devolución:

Remite:

LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO  
c/ Atocha, 98  
Madrid - 12

Goma

Goma

Goma

== / MADRIDA ESPERANTO LICEO / Atoça, 98 / 4ª etaĝo / Madrido - 12 / ==

### ENKONDUKO:

Post laciga esperanto-jaro por ĉiuj (ĉu por ĉiuj aŭ por iu malpli multo?), komenciĝis la ferioj. Dum tri monatoj ni ripozis sufiĉe, sed la tempo finiĝis. Ni havas novajn fortojn; kial, do, ne uzi ilin? En la Liceo restas ankoraŭ multaj aferoj farendaj. Se vi vin sentas esperantisto, kaj havas la tempon kaj la kapablon ilin fari, jam estas la momento eklabori.

La ferio finiĝis. Nova laborjaro komenciĝas. Ĉu vi estas kun ni?

oficiala informilo de *m.e.l.* \*

## EN MADRIDO

**VIZITOJ:** Pasintan monaton ni ricevis du vizitojn: Jan Lamač el Slovaĥio, kaj sinjoro Yang el PR Ĉinio. Tiu lasta parolas pri si ankaŭ kaj aliaj temoj. Kiel reprezentanto de la Komunista Partio de Ĉinio montris ekspozicion en la festo de la hispana K.P. Li tre afable oferis ĝin al la Liceo malmultekoste.

**VOJAGOJ:** Juan Carlos Ruiz vojaĝis tra Portugalujo. Li promesis aranĝi projektadon de diaPOSITIVOJ. José F. Arroyo vizitis Japanujon, kaj tie faris filmon. Ni esperas ke, li baldaŭ projekcios ĝin al ni.

**SEMINARIO PRI SPORTE:** Finfine oni akceptis la realigadon de la seminario. La nomo estas "Internacia Seminario pri Sporto". Jam oni petis de la reĝo ke, li bonvole akceptos la prezidentecon.

**LITERATURA KONKURSO:** Jam finiĝis la ricevperiodo de nia konkurso. La partopreno ne estas tre alta (ekcepte poezio), sed ŝajnas ke sufiĉe kvalita.

**LIMERIKA KONKURSO:** Santiago del Pino gajnis la trian premion de la konkurso pri limerikoj organizita de "Klubo de amikoj al UNESKO" de Barcelono.

**SUBTRAJNA AFIŜO:** En la stacidomo "Sol" ni gluis komercan preĝan afiŝon. Ĝin faris niĝaj samideanoj Douglas kaj Rosario.

**NOVA KURSO:** Jen la horaro: lundo kaj vendredon, mardon kaj ĵaŭdon, de la 7<sup>a</sup> ĝis la 8<sup>a</sup>, 30, kaj de tiu lasta horo ĝis la 10<sup>a</sup>. Sabaton de la 11<sup>a</sup> ĝis la 1<sup>a</sup> matene. Merkredon, konversacia rondo je la 8<sup>a</sup>, 30. La kurso daŭros ĝis decembro. Tri niveloj: elementa, meza kaj supera.

**ĈINAJ LIBROJ:** Kiel rezulto de la akĉeto al sinjoro Yang, ni havas grandan stokon de ĉinaj libroj. Ili estas interesaj kaj malmultekostaj. Akĉetu kelkajn kaj helpu la Liceon.

**UNIVERSITATO:** Oni planas aranĝi specialan propragandon por la universitato. Tie ni esperas atingi bonajn rezultojn.

## EN HISPANIO

**HEJS-JUNECO:** La Oficiala Organo de H.E.J.S., sendonta baldaŭ, ni estas preparantaj en la Liceo. Ni opinias ke, ĝi estos sufiĉe interesa.

**SUBVENCIO:** nome de la Junulara Sekcio de H.E.F., kaj por la venonta tenĉaro de Logroño, oni laboras por atingi subvenciom de la Ministerio pri Kulturo. Tre eble ni atingos ĝin.

**BOLETIN:** Aperis la lasta numero de la Oficiala Organo de Hispana Esperanto Federacia. Ni ĝin foliumis, kaj trovis ĝin interesa.


**FUTBOLĈAMPIONEKO:** Oni intencas peti de la Organiza Komitato de la monda futbolkampioneko la eblecon ke, ekzistos esperantaj tradukistoj en ĉi. Oni petos ankaŭ la tradukon de futbalaj prospektoj en Esperanton.







NOVA NAGEJO DE MADRIDA ESPERANTO LICEO



Gi komencos funkcii la venontan 28-an de Decembro, grava festo de nia kalendaro.

KURSOJ DE ESPERANTO

LICEO :

Lunde kaj vendrede: 7-8'30 aŭ 8'30 - 10. Geprofesoroj Laureano, kaj Victoria kaj Mamen.

Marde kaj Jaŭde: 7-8'30 aŭ 8'30-10. Profesoro Augusto

Sabate: 11-13. Profesoro Chema

Perfektiga: Merkrede 7-8, vendrede 8-9. Profesoro Miguel Angel

Konversacia rondo: Merkrede 8'30-9'30. Gvidantoj; Gian Carlo kaj Ada Fighiera.

KLUB DE AMIGOS DE LA UNESCO. Tirso de Molina 8

Marde kaj Jaŭde: 7'30 - 9 . Profesoro Juan Navareño

UNIVERSIDAD PARA LA TERCERA EDAD. Maestro Alonso

Geprofesoroj; Georgette Lelievre kaj Francisco de Diego

OFICEJO DE N.E.F. Strato Rodriguez San Pedro 13

Aŭkorad nekunataj la horoj kaj la profesoroj.

KVARTALO SAN BLAS

OPINIOJ

En niaj E-periodaĵoj mi ofte lernas la espericajn esprimecojn : ni semos kaj semos ĉis la atingo de nia celo, aŭ - ĉis la fina venko de Esperanto ni devos labori konstante, efike kaj senpaŭze. La demandoj estas; ĉu ni estas tro optimismaj?. Ĉu iam vere venkos Esperanto?. Ĉu iam ĉiu homo parolos Esperanto-n ?. Mi ne estas tiom optinisma, kial ?. Maksimume, kion povas atingi la E-Movado estas, ke nia Internacia Lingvo estos akceptata en la kulturitaj landoj, kaj mi skribas kulturitajn landojn celante tiujn, kies kulturo laŭdire estas pli alta ol en la aliaj. Ĉi tiu distingo evidentigas du malsemajn grupojn, unu, en kiu Esperanto povos esti iam akceptata kaj alian, por kiu ni ne devas revii, Esperanto, neniam havos influon.

Post tiu analizo, la konkludo estas, ke plene neniam venkos Esperanto. Estas landoj aŭ zonoj de nia mondo en kiuj Esperanto ne estos konata. En la nomata "tria mondo" - esprimo, kiun ni ne komprenas, ĉar mi ĉiam aŭdis pri unu mondo - ekzistas landoj en kiuj la analfabeteco estas tiom granda inter la indiĝenoj, ke la instruado de Esperanto estas simpla revo. Estas en nia mondo estaĵoj homaj, kiuj ankoraŭ vivas en plena primitiveco. Ĉu estas eble en tiaj kondiĉoj la instruado de Esperanto. Racia respondo diros al ni ne. Do, la tuta homaro neniam esperantiĝos.

Paradokse al tiu aserto, novus okazi, ke en iu el tiuj "analfabetaj landoj" - kaj mi petas pardonon pro la adjektivo "analfabetaj" -, la instruado de Esperanto estus pli facile realigebla. La situacion ni povus kompari al tiu virga grundo, en kiu la semo post adekvata prizorgo, enradikiĝas forte kaj rapide. Sed la problemo estas kiamaniere konvinki altrudi al tiuj popoloj kaj al ties regantoj la instruadon de iu stranga lingvo, se eĉ tiu, kiun ili parolas ne estas skribata nek legata. Ĉu eblus, doni tiun gigantan paŝon antaŭen?. Malfacile oni povus "gajni" la landajn gvidantojn pri la avantaĝoj de internacia lingvo, kiun fakte ili ne bezonas. Cetere kun kiu ili povus rilatiĝi se la internacia lingvo estas



ankoraŭ akceptita de neniu lando?. Sub tiu vidpunkto, ŝajnas kvazaŭ la Internacia Lingvo, devus alveni al tiuj landoj kun la progreso. Sed prezentiĝas krome la problemo, ke se la progreso estas importita ankaŭ oni importos la lingvon de la eksportanta lando. Sub tiu opinio la situacio fariĝus simila al tiu hodiaŭ ekzistanta en la "progresintaj landoj", kun la krima malavantaĝo, ke oni devus lerni la progran lingvon la "importitan" kaj la internacian. Ankaŭ novus okazi kaj en la praktiko tio jam estas realaĵo, ke la respondeculoj, la gvidantoj kaj privilegiuloj lernus tiun "importitan lingvon" bezonatan en siaj rilatoj kun la jam menciitaj progresintaj landoj. Tiu lingvolernado, fare de la landa elito, estus serioza baro por la diskonigo kaj akceptado de la internacia lingvo. La popolo ne lernus la "importitan lingvon", sed ankaŭ ne la internacian, kaj se la popolo ne lernas Esperanton, la triumfo de Esperanto neniam realiĝos.

Evidente, ankaŭ en la progresintaj landoj ekzistas multaj problemoj, sed tiujn opiniojn ni ne kreestu ĝis veranta fojo, ĉu?

Luis Serrano Pérez

Luis Serrano Pérez

Sabadell 1-5-1981





28-an oktobro, 8-a vespere: Prelego kun lumbildoj pri "Insulo Madeira" kaj "Picos de Europa", fare de Juan Carlos Ruiz Sierra.

31-an Oktobro, 7-a vespere: GRANDA FESTO, kun ludoj, Bingo, dan-  
cado kaj trinkado. Invitilo: 150 pesetojn.

San Novembro, Dimanĉo. Tuttaga ekskurso al la montaro la Pedriza.

11-an Novembro, 8-a vespere. Prelego en Esperanto, farota de la  
itala esperantisto Gian Carlo Fighiera.

29-an Novembro. Tuttaga ekskurso al la monto PENALARA

ZAMENHOFA FESTO



D-ro L. L. ZAMENHOF  
Kreinto de Esperanto  
(1859-1917)

Okaze de la 122-a datreveno de la nas-  
kiĝo de Zamenhof, ni havos feston laŭ la  
jena programo;

5-an Decembro, 7'30 vespere:

- 1.- Projekciado de filmo en Esperan-  
to pri Japanio, farita de nia samid ano  
José F. Arroyo.
- 2.- Biografia prelego pri Zamenhof.
- 3.- Disdonado de premioj de la III-a  
Internacia Literatura Konkurso.
- 4.- Disdonado de atestiloj inter la  
gelernantoj.
- 5.- Teatro.

15-an Decembro. Bankedo.

L O T E R I O

Jam komencis esti disvendata nian numeron por la kristnaska loterio.  
Aĉetu ĝin rapide kaj helpu nin vendi ĝin.

ESPERANTO - LICEO

Atocha, 98, 4.º MADRID-12

Teléfono 230 87 98

*Una lengua común  
Un paso hacia la Paz  
Aprenda ESPERANTO  
Cursos gratuitos trimestrales*

**LOTERIA NACIONAL**

**Núm. 19.438**

El portador juega la cantidad de **CUARENTA PESETAS**  
en el número arriba indicado, para el sorteo que se celebra-  
rá en Madrid, el día 22 de Diciembre de 1981.

EL DEPOSITARIO,


Son: 40 Ptas. (Caduca a los 3 meses)

Todo recibo que carezca de sello o firma será nulo.

PAGOS: Martes de 8 a 9,30.

Se ruega un donativo de 10 ptas.

Nº 0801




A Ŭ T U N O

Vi ne bruu, silentu malhela arbar'  
kaj sopiron de l'kor trankviligu,  
Amas mi nur susuron de la foliar'  
do bruegon timigan ĉesigu.

Tiam iros mi certe laŭ nia arbar'  
meze de la blankaj betuloj  
Aŭskultos ilian ĉarman kantar'  
senvortan melodian karulan

Kaj la flustra susur melodi'  
Kiu kreas arbaran fabelon  
Tuj forigas malĝojon de mi  
kaj sopiron de l'koro forpelos




Poemo originala de nia ĉarmega moskova samideanino A. Malm.

H U M O R O



- Estonteca devinulo aŭguras sian memmortigon...  
kaj li trafas.

.....



- Evitu la mortojn en landvojo.... stiru tra la  
trotuaro.

- Ĵakĉjo diras al sia fratino;

- Fratino, ĉu vi volas vidi la avon imitantan  
lupon?

-Jes- Demandas la fratino.

Ili du iras en la ĉambrom de la avo kaj Ĵakĉjo de-  
mandas al li:

- Avĉjo, de kiam vi ne..... ?

Kaj avo respondas: uuuuuuuuuuu!

.....

- Kazerno estas apud monaĥinejo: Do, la ĉefmonaĥino  
plendas al generalo ĉar de la fenestroj de la mo-  
naĥinejo oni vidas la soldatojn nudajn matene. La  
generalo iras en la monaĥinejon kaj rigardas tra  
la fenestro, sed li vidas nur la kazernan barilon  
kaj diras:

- Mi bedaŭras, sed mi vidas nenion.  
Kaj la monaĥino diras;

- Les... sed surpriz... sur si... t... ?